

KAMPARANA SOLIDARECO / PIEADC

Avenuo Kamisuku II, Kvartalo Munyange, Urbo Kalima, Teritorio de Pangi/Maniema/RD Kongo

TRIA ETAPO DE LA TRINKAVA PROJEKTO EN KALIMA

I. HISTORIO PRI LA PROJEKTO

Tiu chi projekto komencas en la jaro 2013. Kamparana Solidareco/PIEADC por respondi al la problemo pri la trinkavo en Kalima iniciatis ghin. Grandega projekto kiu necesigas sufiche da rimedoj, ekde la jaro 2013 faris sian unuan pashon en la Ghenerala Hospitalo de Kalima al kiu antaùlonge post la bankroto de SOMINKI mankis akvon. Kamparana Solidareco dank'al monhelpo de la germana WKV AG kaj AVE, monhelpo de 3000 Euroj establis la projekton kaj post la realigo la Ghenerala Hospitalo de Kalima kaj krome ch. 70 familioj en la najbareco ricevis akvo-provizon.

Sekve PIEADC pledis por ke aliaj enloghantoj de Kalima havu bonkvalitan akvon. Dank' al monhelpo de de WKV AG, fonduso de Hans, kontribuo de Verduloj Esperantistaj (AVE) kaj de Betty Chatterjee, la dua etapo okazis kaj chifoj la mono utiligita estis 10.000 Euroj. Tio okazis en 2014. Tiel la enloghantoj de Camp Central, kaj la najbaraj avenuoj (Kiswaka I, Camp Famille kaj avenuo Mapendo) ricevis salubran akvon. Dank' al tiu projekto, la distanco mallongighis por la familioj kiuj antaue iris km-ojn por havigi al si akvon. Ankaù la kvalito de la akvo estas la grava afero kiu plibonighis. Kun ghojego pli ol 3000 homoj uzas la akvon.

Dividinte la saman ideon, oni petis al PIEADC establi plian projekton por ke, iom post iom la tuta urbo havu akvo-aliron.

Tiuokaze PIEADC prezentis planon kiu, se ni sekvus kaj trovus rimedojn estus grava fundamento por ke, iam la tuta urbo havu l'akvon. La plano estas havigi al PIEADC 80 mil Euroj per kiuj kunporti per tuboj kvantegon da bonkvalita akvo el la fonto de la rivero ABUKI.... Fonto kiu trovighas en la monto kaj kies elfluo estas bonega kaj laù analizoj la akvo estas bonkvalita, pura kaj ne bezonas multajn laborojn por la putigo... La ideo restadas la sama kaj daùre PIEADC zorgos pri la projekto kaj chiam vokas subtenantojn (privatuloj, fondajhojn, asociojn, organizojn ktp), kiuj pretus monhelpi.

Entute PIEADC bezonus minimume 248.000 Euroj por konkretighi la projekton. Nehavanta tian monsumon, la projekto iras etapo post etapo kaj denove, ni prezentas projekton kies kompleta financado estas 11.000 Euroj.

II. TRINKAKVA PROJEKTO EN LA AVENUO CAMP PLESSY

Camp Plessy estas avenuo kiu trovighas en la mezo de la kvartalo MUNYANGE. Sude trovighas la avenuo Camp Famille, Norde la avenuo Camp Cantine kaj Camp des Appointés, oriente la avenuo Ville3 kaj Nord-okcidente la avenuo Kamisuku II.

La distanco inter Camp Central kaj Camp Plessy estas 1,5 km. Tie loghas chirkau 1000 familioj. Se aldonas kelkaj familio de Camp famille kaj la proksmaj loghejoj, tiu projekto povas provizi 1.500 familioj, do, ch. 4800 personoj.

Nia laboro konsistos el la achatado de tuboj, genu-tuboj, kranoj, gluajho, fosado de fossejo kie kushos la tuboj, toniplo, la transporto de la materialo, manlaborado, niploj, mufo, konstruo de kranaro, gruzo, ktp. Tiu bugheto estas iom alta pro la fakto ke, la distanco inter la Kranaro BETTY ghis Camp Plessy estas longa kaj ankaù ni renkontos obstaklojn. Char estas konstruitaj domoj kiuj ne faciligos al la laboron ; ni devas chirkau kelkajn domojn.

surlokaj prezoj en usonaj dolaroj

N°	Destino	Kvanto	Unuope USD	Prezo USD
	Fera Tubo de 3/4	2	65	130
	Plasta tubo	1200 m	480 po 100m	5760
	Sakoj de cemento	15	50	750
	Sablo kaj gruzajho			120
	Ellignajho			30
	Tranchilo	3	5	15
	Piocho	2	15	30
	Shpato	8	5	40
	Glujajho	5 skatoloj	35	175
	Niplo 3/4	10	10	100
	Niplo 2 colo	10	20	200
	Toniplo 3/4	6	5	30
	Toniplo 2colo	6	4	24
	Kranvalvo 2 colo	10	25	250
	Kranvalvo 3/4	10	15	150
	Mufo 3/4	20	25	500
	Krano	8	15	120
	Teflono	10	4	40
	Niplo 3/5	20	10	200
	Tubkurbajho 3/5	10	15	150
	Tubkurbajho 2 colo	25	7	175
	Premreduktilo 2colo x1colo	5	10	50
	Premreduktilo 1x3/4	5	5	25
	Plumbisto			800
	Masonisto	5		500
	Nutrado			300
	Transporto materialoj (tuboj,kranojktp) Goma-Kalima			1200
	Transporto cemento Kindu-Kalima			150
	Sanaoficejo			80
	Transporto en Kalima			230
	Sume / en US-dolaroj			12044

Bonvolu ankaŭ vi subteni la projekton. AVE kolektas la monon de esperantistoj sur sia **UEA-konto : avex-z** krome en rimarkinda akvo-botelo okaze de Esperanto-aranghoj

Koran dankon de Etienne kaj la loghantoj de Kalima, krome de Manfred (AVE) kaj Betty

AVE: www.verduloj.org/afriko.htm > D.R. Kongo kaj Tanzanio (Mazingira)

Blogo de Betty : [Akvo-blogo de Betty](#)

PIEADC : pieadc2006@yahoo.fr

Retejo : www.kamparanasolidareco.weebly.com

Tel: +243 998735042